

---

# 正因果 - 正しいものの考え方

## *La ĝusta rilato de kaŭzo kaj rezulto*

加藤教順 / Kato Noriyori

---

仏教となりの教であればどの宗派でも因果の道理を説くのであって、因果の道理を説かないのは外道であると昔より言われていたものである。

詳しくは因縁果であって、たとえば豆の種子（因）が水とか太陽の熱（縁）によって芽を出し養分（縁）をすって成育し実（果）を結ぶという自然科学的法則と同じように、私どもの幸福や苦悩は因縁果の法則によってつくられるものであって、この道理を認めないもの、また認めても正しくないものは仏教とはいわれないのである。

この仏教でないものの考え方を『三論玄義』という古い書物から見ていこう。

### (1) 邪因邪果

これはまちがった因果を考えるもので、多くの迷信はこの考え方から生れ、仏教を名のる宗派・寺院の中にもこれを増長するものがありよく注意せねばならぬ。日をえらんだり方角をいったり、まじない、祈祷、占いなどはまったく邪因邪果であるといわねばならぬ。

ある外国の宗教学者の見聞記によると、日本の宗教のうち、90%までは俗信迷信の類で、しかもヨーロッパでは反宗教の人のみでなく宗教家の中にもかかる迷信的要素を除いてきたが、日本では宗教家が迷信を真の宗教にとって危険であると思わず、むしろそうし

Ĉiuj ajn skoloj de budhismo instruas la racian rilaton de kaŭzo-rezulto, dum ne budhismaj religioj ne instruas ĝin; oni tiel diras de antaŭe.

Pli precize dirite, la rilato konsistas el kaŭzo, kondiĉo kaj rezulto. Ekzemple, la semo de fabo [kaŭzo] ĝermas, kreskas kaj fine naskas frukton [rezulton], kun la helpo de akvo, sunvarmo kaj nutraĵo [kondiĉoj]. Same kiel tio ĉi, nia feliĉo aŭ sufero estas regata de la leĝo de kaŭzo-kondiĉo-rezulto. Se iu religio ne akceptas tion ĉi aŭ malĝuste akceptas, ĝi ne estas budhismo.

La malĝustajn pensmanierojn mi prezentu el la malnova libro *komentario pri la tri disertacioj*.

### (1) malĝusta kaŭzo-rezulto

Multaj superstiĉoj naskiĝis el tiu ĉi pensmaniero. Eĉ el budhismaj sektoj kaj temploj iuj nutras ĝin, do ni devas esti singardaj. Preferi bonaŭguran tagon aŭ direkton, ekzorci, sortodiveni; jen la ekzemploj de malĝusta kaŭzo-rezulto. Iu fremdlanda sciencisto pri religio skribis, ke inter japanaj religioj 90% estas superstiĉoj, kaj ke en Japanio eĉ religiuloj akceptas superstiĉojn sen vidi ilian danĝeron kontraŭ vera religio, dum en Eŭropo kaj religiuloj kaj kontraŭreligianoj ekskluzivas superstiĉajn elementojn.

たものがあるということがさもあたりまえであるかのように感じられる、と批判している。

自動車に交通安全の札を下げ、ヒノエウマの女を嫌い、病院に四号室がなく、先祖の祟りを恐れたりするなど、まったくこれが文明社会かとあきれるような邪因邪果が多い。

## (2) 無因有果

これは何も努力しないで結果だけを得ようとするもので、よくいえば夢想家であり、悪くいえばバクチ打ちのようなものである。宝くじを一枚も買わないで当たった時を心配するようなものである。

## (3) 有因無果

これはどんなことをしても責任を持たないということで、したいことをしてあとはどうにでもなれという刹那的享楽主義のようなものである。報いというものはなく地獄は作り話だとかたづけられるようなもの。

## (4) 無因無果

これは、何も無い、努力もしないし、結果もいらない、ただ何となく生きている虚無主義者のようなものである。朝が来るから目を覚まし夜が来ると寝る、腹が減れば食べる、無気力なぼんやりとした生き方である。

このような間違った考え方を改めて、ごく当たり前のありふれた因果の道理をふまえて、どんなことにも恐れず安心していける道が、仏さまをあてだよりにした信仰生活である。

Kaj li kritikis, ke por japanaj religioj superstiĉoj estas kvazaŭ pravaj.

Mi miras pro tiel multaj superstiĉoj: meti talismanon por trafika sekuro en aŭton, forigi la ĉambron de numero 4 en hospitalo, timi plagon de prapatro... Kial tiuj ĉi povas esti en civilizita socio?

## (2) rezulto sen kaŭzo

Tio ĉi estas maniero de fantaziulo, kiu nur atendas bonan rezulton neniel klopodante, aŭ de vetludanto. Kiu maltrankviliĝas pro profito de loterio, kiun li ne aĉetis?

## (3) kaŭzo sen rezulto

Tio ĉi estas sinteno ne respondecigi pro rezulto de tio, kion li faris; aŭ impulsisma epikurismo, kiu instigas ĉian plezuron pensante, ke poste sekvu io ajn, ke ne ekzistas rekompenco, kaj ke infero estas nur fantazio.

## (4) ne kaŭzo nek rezulto

Tio ĉi estas iusence nihilismo. Nihilistoj pensas, ke nenio ekzistas, kaj nur sencele vivas sen klopodo ne atendante rezulton. Ellitiĝi en mateno, enlitiĝi en nokto, manĝi en malsateco; tiel inerta kaj pigra vivmaniero.

Ni devas korekti ĉi tiajn malĝustajn pensmanierojn. Surbaze de tute natura kaj ordinara racia rilato de kaŭzo-rezulto, ni vivu trankvile kaj sentime; jen tio estas la vivo de kredo rifuĝanta al Budho.